*Rosetta* sendube konis la arton forigi el sia matensaluto la amindan logon. Ŝi eble iris iom pli rigide. Eble ŝi senpene kapablis froste pinĉi la lipojn kaj rifuze fiksrigardi antaŭ sin, dum ŝi mallonge kapoklinis al li. Kiel ajn, tio baldaŭ konfuzis la junan industriiston. La hontigo fugiĝis lin. La malordo, kontraŭe, faris lin entreprenema. Li skribis al ŝi leteron, kiu tenis la mezon inter afera oferto kaj kortusa konfeso. La postan tagon ŝi, iom pala sed sinrega, paŝis al li. Liaj manoj jam levigis por rave akcepti la ŝiajn. Ŝiaj manoj efektive tuŝis la liajn, sed la tremo reiris al ŝia koro kaj ŝi jam ridetis.

«Mi studas. Mi fiksis miajn pensojn sur la studo. Sed kun ŝi, tie, kun mia juna fratino, vi estos feliĉa.»

Li konsternis suprenrigardis kien ŝi indikis. Li vidis mirantan knabinovizaĝon, plenan de angoro kaj de sindono. Li diris: «Pardonu». Li diris tion al rekta dorso, kiu foriris rigide rekta: al *Rosetta*. Li hezite kapsalutis unufoje en alian direkton: tiun de *Maria*.

Du monatojn poste, la juna industriisto edziĝis — ĉu mi diris ke li nomiĝas

verkis: Maurice Roelants  
el la flandra: T. Van Gindertaelen

*Herman Noteboom*? — al *Maria*. *Herman* kaj *Maria* radiis en la geedza festo, kiam ili rigardis sin. Timeto kaptis ilin nur kiam ili aŭdis *Dron Rosa* — ŝi ĝuste doktorigis — spici la feston per gajaj rakontoj kaj per sia perla rido. La manĝoj, la trinkaĵoj kaj ilia juna feliĉo, unuvorte ĉio faris dolĉan narkoton superrega. La ofero estis plenumita. Estas ankoraŭ belaj ekzempleroj de fratinoj.

\*\*\*

Esti verkisto iam estas privilegio. La homoj facile rigardas vin konfesprenanto, eĉ kiam ili trovas vin silenta atestanto, kiu vivas, amas kaj suferas ne por propra konto. Ili prenas vin konfidato, kiu restadas surtere por konsili. Post dudek jaroj da edzineco, *Maria* konfidis al mi ke ŝi ricevis la feliĉon el la manoj de sia fratino. Kiel instruistino, *Dro Rosa Dierickx* havis belan karieron kaj dufoje ŝi estis profunde malfeliĉa.

«Ŝi estas vidvino kaj la kuracistoj rezignis min...»

*Maria* ne estas ekscesa adoleskantino. Ŝi aspektas pala kaj diafana kiel malforta suno en oktobra nebulo, sed energia.

«Evidu vanan konsolon. Mi scias kion mi diras.» Kial ŝanceli ŝian stikon? Cetere nenio mola en ŝia teniĝo aŭ en ŝiaj vortoj, nur ega seriozo kiun ŝi, kurage ridetante, mildigas kiam ĝi fariĝas tro solena.

«Se vi ne kapablas konsili min, kiun mi do petos? *Herman* estas elstara viro, aferisto kaj en aferoj tre praktika, sed ekster ili, koncerne la koron, senimaga kaj tro timida.»

Mi vane serĉas en mia imago kian konsilon *Maria* esperas de mi. Mi streĉe atendas.

«Kiam mi ne plu estos... (ŝi severe esploras mian okulon, ĉu mi havos malpli da kuraĝo ol ŝi por vidi la realon kia ĝi estas...), tiam *Rosa* edzigu *Herman*. Kion fari por ke mi forpasu kun ĉi tiu certo?»

Mi klinas la kapon. Mi balbutas ion jenan:

«Ĉu vi ne lasus tion al la vivo mem?» Sed ŝi rigardas min elreviginte.

«Mi ĝuis mian parton. Mi estus feliĉega se *Herman* estus zorgata, vi ja komprenas min, se li falus en bonajn manojn, kiajn li ĉiam ŝatis. Mi estus feliĉega se mi povus doni al *Rosetta* kion ŝi donis al mi. Konsilu min...» Neniam mi vidis larmojn tiel beatigi vizagon kiel kiam mi promesis paroli al *Herman* kaj *Rosetta* en la oportuna momento.

«Se tio nepre necesus...» Sed ŝi punas min per severa rigardo, kvazaŭ signante:

«Mi estas forta kaj kuraĝas rigardi la morton en la okuloj. Ĉu vi ne traktus min kiel iun fortan?» Post tio ŝi kaptas mian manon. Kia virino, kiu tiel simple kaj patose dankas manpreme!

\*\*\*

*Maria* mortis. Mi heredis nur malmulte de ŝia kuraĝo. Mi suferas, kiam mi parolas al ŝia fratino. Sed ŝi, ŝi mokridas min:

«Kia delirajo? Mi estus aminta *Herman*!»

Ŝi mordas sian batistan poŝtukon, per siaj dentoj ŝi ŝiras ĝin stria.

«Super ĉio mi amis mian fratinnon.»

«Ĉu tiam vi ne devas sekvi ŝian plejlastan ordonon?»

«Ne por mi.»

«Ne, pro ŝi.»

Ŝi ridetante luktas, dum ŝi kapskuas, kun aflika emocio. Tuj aferoj en la vivo malfruas kaj iuj memoraroj lasas pikilon en la koro.

«Vi ĉiam amis vian «fratinnon». Ankoraŭ veras.»

Ne estas iomete ironio en mia simple dirita dusencaĵo.

Ŝi klinas la kapon, ankoraŭ sendecida, sed la akcepto jam levigas en ŝi, malrapide, kiel la akvo en elpumpita puto. Ŝi metas manon en la mian, kvazaŭ mi estus ĝin petinta por mi. Estas malfacile ĉiam esti konfidato en la vivo. Sed mi sopiras kaj estas feliĉa. Helpate de la tempo, mi esperas sukcesigi la intencon de *Maria*. Ĉar *Herman*, kvazaŭ apopleksia, sufokiĝas en timemo, malerte levas la rigardon kaj baldaŭ lia apopleksio transiras en hon'nan rideton.

**ROTTERDAMA URBOKORO**: eldonita de la konsilejo por la rekonstruo de Roterdamo. 1947, 28 p. Adreso: W. Borsje, Multatulistraat, 29 Rotterdam-W.

La supra libreto enhavas multajn kaj interesajn detalojn pri la historio de la Urbo, la brulego en majo 1940, la evoluo de la rekonstruo-plano kaj de ĝia realigo kaj prezentas klaran generalan skizon, pritraktas la teknikan preparon, la zonadon, la trafikajn problemojn kaj diversajn statistikajn elementojn. La libreto ilustras krome du grandaj koloraj kartoj, kiuj koncernas la rekonstruon, kaj multaj aliaj grafikaj.

La eniavo estas ege interesa, la prezento plaĉa, la lingvo modela (cetere kontrolita de la Lit. Kom. de A.L.E.). Resume: nepre havignda dokumento! Mi ege konsilas al ĉiu interesato turni sin, por ricevi ĝin, al la supre indikita konsilejo.

T.V.G.

**LA ANTIKVA GREKUJO — INTER LA ARABOJ — SIAMO**: eldonis *Esperanto-Film-Grupo*, Antwerpsestr. 45, Bergen-op-Zoom (Nedland).

Jen trio de filmstriaĵ prelegoj, nepre instruaj, altnivelaj kaj plaĉaj, kiujn la eldonejo prezentas al ni; ni certas ke multaj grupoj deziros helpe de ili pligrabli siajn kunsidojn kaj samtempe pliklerigi siajn membrojn; se enestas sufiĉe oftaj eraroj en la unuaj kajareroj (korekto-listo estas cetere aldonita) la postaj estos lingve perfektaj kaj meritos nur laŭdojn el ĉiuj vidpunktoj. Ni rekomendas la sistemon al la flandraj gesamideanoj kaj sciigas ke F.E.I. peras la mendojn kaj donas ĉiujn deziratajn informojn.

T.V.G.

## RADIO PARIZO

La oficiala franca radio en Parizo okazigas, ek de la 15-a de decembro pasinta, ĉiutage elsendojn en Esperanto, de la 18.15 ĝis 18.30 h. (franca horo).

Guidas la elsendojn: *F-ino Huguette Royer kaj Sro Delaire*.

Nepre skribu tuj en Esperanto al «*Radiodiffusion Française*», *Emissions Espérantistes pour l'Étranger*, 118 Champs Elysées, Paris 8<sup>e</sup>, por danki kaj gratuli.



**NOVAJ ESPERANTO-HISTORIETOJ**, de diversaj aŭtoroj, eldonis *Dansk Esperanto-Fortaj*, Aabynoj, 70 p., 1947. Havebla ĉe F.E.I., 30 Fr.

Mi tute konsentas kun la antaŭparolo de la libreto, kie ĝia celo estas indikita jene: 1) doni al kiubo, kursoj kaj studrondoj materialon por parola ekzerco. 2) doni al novaj Esperantistoj sufiĉe facilan legadon.

La libreto estas plaĉaspekta, la papero bela, la lingvo modela, cetere kontrolita de la Literatura Komitato F.L.E. Kelkaj historietoj estas tre gajaj kaj spritaj. Almenaŭ ĉiu sekcia biblioteko posedu tiun eldonadon.

F.R.

**UNUA VOJAGO ĈIRKAŬ LA MONDO** de A. Da Silva, el la portugala de J. J. Rodrigues, *Portugala Eldona Rondo*, 24 p. Mendebila ĉe la landa peranto: G. Basteels, Montenegrostr. 190, Vorst-Brussel; prezo: unu kajero, 7 Fr.; ses kajareroj 34 Fr.

Laŭ la enkonduko, la libreto inaŭguras «la publikigon de nova populara scienco kolekto, sub la titolo «Enkonduko en la Kulturon». Iniciato vere aplaudinda, ĉar la kolekto traktas temojn, kiuj iel interesas la tutan homaron.

La supra verketo «malkaŝas multajn sciindajn detalojn pri tiu aŭdaca entrepreno kaj la aventuremulo, samkiel la trankvilanima leganto, streĉe sekvas la ŝipanarojn.

La lingvo — kontrolita de la Literatura Komitato F.L.E. — estas sufiĉe korekta, kvankam ensteliĝis kelkaj malperfektaĵoj: foresto de la artikolo en esprimoj kiaj: Karlo V-a; superflua afinaĵo post la jarnombro, iam miriga uzo de verbobtempoj, foje kaj foje manko de la akuzativa kaj direkta -n (p.9, 17).

Preseraroj maloftas kaj kelkaj ilustraĵoj akompanas la interesan disvolvon.

V.

**HISTORIO DE USONO**, de A. da Silva, el la portugala de M. de Freitas, *Portugala Eldona Rondo*, 1947, 28 p. Mendebila kaj prezo kiel supre indikitaj.

En la libreto, ni konatiĝas kun la stariĝo, la evoluo, la internaj kaj eksteraj baroj, unuvorte kun la historio de unu el la plej potencaj nacioj de nia terĝlobo. Ni ekscias de kie venis la kolonistoj (Anglujo, Nederlando, Svedujo, Francujo); kiaj estis iliaj ecoj ktp, ni admiras la eminentan Washington kaj liajn altajn vivkonceptojn, ni sekvas la batalon inter la Nordo kaj la Sudo ktp.

La lingvo estas flua kaj sufiĉe korekta, escepte de kelkaj eraretoj, inter kiuj la supre indikitaj kaj krome, netaŭga uzo de *per* (p.3: sin okupi *per*, p.6, *per* la nomo), manko de necesa artikolo (p.5-6: de golfeto Chesapek), malkorektaj esprimoj (p.8, pli supere = plej malsupre; p.12, solvilo = solvo).

Preseraroj sporadas. Preso grandliterate kaj klara.

V.

**VERSAĴOJ DE JOE**. — 55 p. — Presejeto «Sukro», 2 Cambridge st Willoughby NSW Aŭstralio. — 1947 — Prezo nemontrita.

Zorge maŝinskriba eldono «dediĉita al la adorata Ŝi, mia Narcisa» «sendita kun plej koraj bondeziroj»...

Kial do ne same afabli al Joe? Ĝuste ĉar li havas kvalitojn kaj tial meritas «vero(n) nuda(n)sende eble kruda(n)». Joe estas sincera am-apostolo. Narcisa ankaŭ ĝin atestus ĉe lia «nuda brust-altaro», kie lia koro, — ĉu en «ekstazo de aplombo»? — «deklamas: mi vin amas», kaj kie li estas regalata el «brula bokalo de logaj amkisoj», eble ĝis «Draka devo nigre nin(ilin) disigas». Ve, lia sincereco ne ĉiam estas bongusta kaj poezie sinretena. Ribelan naturon li havas, kies esprimforto ne ĉiam egalas la impeton kaj neintence amuzas («por kiso, atomojn kirliĝantajn mi ĉasetas ĝis kares-paroksismo kaj komuto»).

Subite tamen Joe surprizas per melo-

dia «glore kantas najtingalo en la nest' de nia kor», aŭ per grava «Mi plugis la menson: /Dolora labora; /Elsarkis fi-penson/Per ŝvito kaj ploro/Semis laŭ fido; /Forigis la branon: /Por mia animo/Posedas nun panon». Lia pri-esperanta Muzo dece ne sin levas super la labortablo de serioza verda klubo, sed li pli sukcesas per iu sobra, seka humoro kaj precipe per kelkaj sentencaj versparoj, ol pritraktante «malcivilaj(n) politikoj(n)». La lingvo estas ĝenerale korekta sed ne ĉiam ekzempla, klara, ĝustakcenta. Espereble Joe estonte pli memkritike verkos, aŭ elektos siajn versajojn el la «Sukro-eldonaĵoj».

TYN.

### LA LASTA...

Dum jaroj mi labris  
kaj restis labrint',  
ĉar jarojn mi vagiris,  
ve, propra ignorint',  
tra l' vojoj de la koro  
al salonego, kel',  
tra ĝojo kaj doloro  
al netrovebla cel' —  
labris...Ho, ne ĝenu  
min pri ĉi tiu vort' —  
ankaŭ mi partoprenu  
en vortokrea sport';  
necesas ĉi esprimo  
sen ia kontraŭdir':  
en regno de l' animo  
ĉu estas ja elir' ?  
Sed jen la devo via:  
ne kreu vorton plu,  
la lasta estu mia  
kaj Esperant' tabu' !

Tyneverum

Neniu lingvo sen literaturo!  
Abonu la beletran revuon:

**LITERATURA MONDO**  
150 bfr.

Ĉe F.E.I. P. V. Humbeekstr. 3  
Brussel (p.k. 3268.51)

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — Afdeling Antwerpen. — Zamenhofdag werd gevierd door een spreekbeurt van Dhr Jacobs, en een korte uiteenzetting, bijzonder in 't verband met het afdelingsleven te Antwerpen, door de Bondsvoorzitter, Dr. T. Van Gindertaelen. Op 20 December greep een wegeslaagd kerstfeestje voor de leden, vrienden en kennissen plaats.

V.E.B. Afdeling Brugge. — In het kader van de vierhonderdste verjaardag van Miguël de Cervantes, gaf de voorzitter Drs Fern. ROOSE een zeer gesmaakte voordracht over de onsterfelijke schrijver van Don Quichotte.

Met het Novembernummer zal het maandelijks tijdschrift Paco kaj Justeco, orgaan der Afdeling Brugge, zijn zesde en tevens laatste jaargang voleindigen. Paco kaj Justeco ontstond en verscheen illegaal tijdens de bezetting om een nood te lenigen, namelijk een nood aan Esperantotijdschriften. Die nood bestaat nu niet meer. Daarom, en heel zeker niet uit gebrek aan interesse, verdwijnt Paco kaj Justeco na volbrachte taak.

V.E.B. — Afdeling Gent. — Bij de verjaardag van Zamenhof's geboorte, werd met goede opkomst van het publiek, een Zamenhoffeest op touw gezet, met spreekbeurt van de secretaris A. Van de Velde, schetsen en voordrachten door Arie van de Heuvel-groep uit Gent, een lunch, voordrachten in Esperanto, tombola en gezelschapspelen.

V.E.B. Afdeling Mechelen. — Op 22. 11. 47 werden de vriendschapsbanden tussen de leden weer wat nauwer toegehaald. Een avondmaal, met uiterst verzorgde spijskaart, gevolgd van een gezellig samenzijn, waar het aan leute niet ontbrak, werd ingericht door het O.K. van het XII-de Congres onder het motto: Post laboro, Festa horo.

Anderzijds werd, na deze ontspanningsavond, tijdens de volgende vergaderingen, een ernstig propagandaplan voor E. ontworpen.

Op 17.1.48 zal de afdeling een koffietafel inrichten, waarop onze voorzitter Dr. Zamenhof zal huldigen; vrienden uit het Antwerpse en het Brusselse zijn welkom; de prijs van de koffietafel (en welke! belooft 55 Fr.) Men wende zich tot de secretaris voor inschrijving (uiterlijk 10.1.48): dhr F. Willems, Leuvensesteenweg, Muizen. Men noteer dat het aantal deelnemers streng beperkt is!

V.E.B. Afdeling Oostende. — Dient medegedeeld dat de eerste-jaar cursus een twintigtal leerlingen telt, wat een merkelijke verbetering heet. De tweede-jaar-leergangen worden bijgewoond door een vijftiental leerlingen, waaronder 3/4 van de leerlingen 1946. Antaŭen por nia verda Idealo!

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

Karaj legantoj! — Ankaŭ dum la venonta jaro ni intencas daŭrigi ĉi tiun rubrikon laŭ la samaj principoj kiel antaŭe. Nia celo neniel ŝanĝiĝis: prezentante al vi agrablajn tempopasigilojn, ni samtempe deziras instigi vin al pliampleksigo de via vortprovizo, al pli preciza kompreno de Esperanto, al konatigo kun ĝiaj proverbaro, literaturo, historio.

Malnovaj solvantoj jam sufiĉe spertis, ke atenta serĉado en, kaj serioza studado de fidindaj fontoj senerare kondukas al ĝusta solvo. Komprenoble ni ŝatus pli-vastigi la areton de niaj solvantoj, kaj tial tutspeciala adresas alvokon al vi, karaj legantoj, kiuj ĝis nun ial ne partoprenis la solvadan. Tial, inter pli komplikataj problemoj, ni dum la unuaj monatoj publikigos ankaŭ pli facilajn, per kiuj vi baldaŭ spertigos kaj, espereble, plezurigos. Ne preterlasu do la okazon lude perfektigi kaj gajni de tempo al tempo Esperanto-libron kiel premion.

La REGULARO de la konkurso, rezervita al la liganoj, ne grave aliĝas. — 1. Ĉiu korekta solvo valoras 5 poentojn. Estonte la solvinto ankaŭ el preskaŭ-ĝusta solvo profitos, ĉar pro malmultaj eraroj li ne perdos ĉiujn 5 poentojn. Laŭ transira arango, la poentnombro de la pasintjaraj solvantoj estas multobligata per 5. — 2. Ĉiumonate havinda libro estas aljuĝata al la solvinto kun la plej alta poentnombro. La nomo de la gajninto kaj la titolo de la aljuĝita libro estas reduktata al O; same tiu de partoprenanto, ensendinta neniu solvon en la spaco de 12 sinsekvaj monatoj. La ceteraj laŭokaze konservas aŭ plibonigas sian pozicion. — 4. La solvojn oni sendu ĝustatempe sur aparta folio al POSTBUS 342. BRUSSEL.

Generala ATENTIGO ĈE LA SOLVADO.

1. La difinoj kun (R) celas vorton uzotan sen la gramatikaj finaj A.E.I.O. Tio ne signifas, ke ĝi nepre estu pura radiko; ĝi ankaŭ povas esti kunmetita aŭ derivita. — En krucvortenigmo «u» kaj «ŭ» estu konsiderataj samvaloraj en krucigantaj vortoj. — 3. Ĉiu uzata radiko troviĝas en la VORTARO de VAN STRAATEN aŭ en PLENA VORTARO DE ESPERANTO (SAT). — 4. Pri nomoj rilatantaj al la Movado aŭ al la Esperanto-Literaturo informas:

ISBRUCKER: Historio kaj Organizo de la Esp.-Movado.

DEGENKAMP: Esperanto 60-jara.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr. Enpresigo kostas minimume 15 bfr. Unu int. respondkupono valoras 3 bfr.

Deziras korespondi kun flandraj Esperantistoj: Antonio de Koršoš, inĝeniero kaj grafikisto, Templon ter 25, LORINCI, Hungarujo.

Komercantino, 19-jara studentino, deziras korespondon: Ingrid Monhaupt, Dauerkolonie, Rennbahn, 44, BERLIN-WEISSENSEE, Duitsland, rusa zono.

Deziras korespondi kun samprofesiaj pri dehoraj kaj organizaj demandoj: Oberpostsekretär Ernst Frank, (24 a) MÖLLN (Lauenburg), Germanio, kunlaboranto en Federacia publika servo, transporto kaj interrilato.

Esperanto-eldonaĵoj pri SOKOL kaj pri Ĉeĥoslovaka respubliko: regule, senpage, vi ricevos ilin, anoncante vin kiel interesato ĉe Sokol-kongreso, Narodni 3, PRAHA I, Ĉeĥoslovakio. Interesaj kaj valoraj eldonaĵoj estas krome en preparo.

Okaze de la 21-a S.A.T.-kongreso (31-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto 1948) estas eldonata, propagande kaj subtene, plaĉa kalendareto 1948; ĝi estas mendebla ĉe H. Bultemeyer, J. Van Galenstr. 86/1 Amsterdam W., Nederland, kaj kostas unu r.k.

SOLVO DE LA 29-a ENIGMO. Horizontale. 1. pluvombrelo. — 3. plen-kreskul. — 5. fanatik. — 7. sprit, asert. — 9. en; strof; fi. — 11. ŝidlovskaja. Vertikale. 1. fos. — 2. lili; pensi. — 3. for. — 4. vanta; insul. — 5. net. — 6. Marta; krev. — 7. tra. — 8. rosti; sufok. — 9. kre. — 10. laŭb; refoj. — 11. ŝut.


SOLVO DE LA 30-a. Neĝustaj estas: lotuso, torako, labio, latentaj, zizifo, tipolo, ĉar neoficialaj; nek sopiro, ĉar derivaĵo.

SOLVO DE LA 31-a. Horizontale. 1. skrap. aliĝ. — 2. obl. — 3. reĝim. trovi. — 5. kankr. reala. — 6. abund. — 7. kraĉ. zink. — 8. oft. — 9. lacig. eldon. — 10. ink. — 11. relav. sekig. Vertikale. 1. strik. koler. — 2. akr. — 3. reĝim. akcel. — 4. kaĉ. — 5. pomarb. ogiv. — 7. altern. teks. — 8. edz. — 9. izola. indik. — 10. lan. — 11. griza. kunig.

SOLVO DE LA 32-a. Mi tute ne scias, kio malhelpu tujan respondon, diris la urso, demandante la kamparano, ĉu ĝi havu lian bovinon.

N-ro 33: KRUCVORTENIGMO.

Ankaŭ por novuloj! HORIZONTALA: 1. Komprenigi al iu, ke li revenu (R); oni akiras ĝin per ofta ripetado (R). — 3. Ĝi ŝirmas kontraŭ inundo (R); li faras al vi belan kapon (R). — 5. Tie oni vidas moviĝantaj lumbildoj (R); difini, kie io finiĝas (R). — 7. Salte elflui eksteren, kiel akvo el fonto (R); nekomplika (R). — 9. Junulino (R); pli ol necese. — 11. Aristokrato (R); fasko da pajlo.



VERTIKALE: 1. Parto de planto (R); ĝi donas lakton kaj lanon (R). — 3. Ni vojaĝas per ĝi (R); alta kreskaĵo (R).

N-ro 34: KRUCVORTENIGMO, pri plantoj kaj bestoj, laŭ la krado de n-ro 33.

Horizontale. 1. Floro (R); arbo kun belaj floroj (R). — 3. Ĝi kreskas en ĝardeno (R); aroma vegetaĵo (R). — 5. Legomo (R); aroma vegetaĵo (R). — 7. Floro (R); vegetaĵo (R). — 9. Vegetaĵo, el kies semojn oni faras manĝaĵojn (R); legomo (R). — 11. Ili estas vertebruloj (R); nigra birdo. Vertikale. 1. Vegetaĵo, kies tinkturo estas uzata kontraŭ kontuzoj (R); flava floro (R). — 3. Legoma vegetaĵo (R); fiĵo (R). — Herbeca planto (R); grimpana vegetaĵo uzata por aromigi (R). — 7. Manĝebla kreskaĵo (R); insektomanĝa vertebrulo (R). — 9. Herbaĉo (R); grimpana arbeto (R). — 11. Eksterlanda frukto (R); arbo.

La solvojn oni sendu al POSTBUS 342, BRUSSEL, antaŭ la 20-1-48.

2.

DEVENO & VIVO DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis: Petro Stojan

Iu povus tuforte penadi por krei ion perfekte artefaritan, pure fantazian, malnaturan en absolute novan... Neniel sukcesus li. Traĵtoj desegnitaj per lia mano estos kondiĉataj per ĝia anatomio, heredita de gepatroj. Fantazi-bildoj, imagataj per lia cerbo, respegulos lian mentalon. Liaj plej originaloj elpensaj reproduktos nur malnovajn elementojn, ie ekzistantajn, aŭ iam ekzistintajn. La distingo inter la arto kaj la naturo estas nur por supra rigardo. Atenta rigardado sub aŭ super tiu supraĵon nepre vidigas la fundan unuecon inter natura medio en arta kreado. Antaŭ ol la kemia fabrikado produktis, kaj la arta pentristo kombinis, la mil-mil kolorojn en nuancojn senfine varieblajn, — la insekta mondo (kun la floraro) jam delonge, pratempe, kreis milionojn da pli brilaj kaj pli varieblaj koloroj, nuancoj, rebriilaĵoj, lumtonoj kaj nelombroj... sur flugiletoj, antenoj, petaloj, folioj, fruktoj.

Ĉitie, studante la Esperanto-originojn, ni ĉiam marŝos sur firma natur-sciencia ter-ebeno, malproksime de la klasika filologio, kiu tamen havis la meriton inspiri la aŭtoron de Esperanto, kaj multajn liajn disĉiplojn. Tial la leganto ne miru pri la metod-diferenco inter ĉi-studo kaj ĉiuj antaŭaj studoj pri la sama temo.

Por la klasikulo — la lingvo Esperanto aperis izole, subite, kiel Deus ex machina de antikvaj tragedioj, kiel Fiat lux de la Biblio. Por la evoluisto — ĝi estis delonge ĝermata frukto, maturinta dum multaj generacioj, kaj fine rikoltita per la homo, kiu, en taŭgaj momento & loko, troviĝis en la centro de interkrucantaj linioj de sociaj fortoj, influoj & ideoj. Nia lingvo estis natura produkto de la konscia homaro, soifanta al la ideala unueco. Produkto simila je la miel-trezoro, kiun pacience kolektis miloj da abeloj, modestaj idoj de iu fervora abel-reĝino, ade peninta en mistera ombro de la abelujo...

Ni do kuraĝe studu la lingvon per la samaj metodoj, per kiuj ni sekvas la evoluon de lepidoptero tra ĝiaj stadioj: ovo, raŭpo, pupo, papilio... kaj la evoluon de religio tra ĝiaj fazoj: mito, kulto, rito, dogmo... Tie & ĉitie nin okupas malpli la ekstera formo ol la interna proceso, tiu ena vivoflugo, kiu kunigas ĉiujn mekanikajn pecojn en unu tuton, kiel la ruĝa fadeno en la kolringa perlaro.

Sub la senmova reto da linioj & literoj, tra la kaoso da reguloj & esceptoj, en la amaso da frazoj, tekstoj, artikoloj, — ni serĉas la post-signojn de iliaj aŭtoroj, iam vivintaj homoj, homoj — kiel ni — kun ĉiaj mankoj, talentoj, virtroj & malvirtroj... Ama aŭ malama, junviva aŭ kaduka, tia aŭ alia, tamen ĉiam pulsas la vivo en la manoj, kiuj iam skribis la unuajn librojn en Esperanto.

Ĉiu generacio havas sian taskon. Por dece plenumi la nian, ni unue ekkonu ĝin, kaj poste agu. Nur konservi... verkajon de la antaŭuloj, nur esperi... agadon de la posteuloj, — estus perferi nian idealon. En ĉi-skizo estos difinita la tasko de nia generacio kiu okupas la gravan lokon, situantan inter la ruinoj de pasinto & vizioj de estonto... Desegnante la viv-fortajn liniojn, kaŝitajn en

nia heredita lingvaĵo, ni pense daŭrigos ilin al la antaŭ-sentata estonto: tiel gravurigos la direkto, la vojo celita... tra nuna kaoso da personaj opinioj, ambiciaj disputetoj, vanaj ekkomencoj...

\*\*\*

Por klare penskapiti la naturan sinsekvon da fazoj, kiuj rezultigis la nunan Esperanton, necesas dispartigi la evoluon daŭron. Tri periodoj sufiĉas.

Unue — praa aĝo, kiu preparis la mozaikan multlingvecon en Orienta & Meza Eŭropo. Sen tiu multlingveco ne ekzistis eĉ bezono de komuna interlingvo, nek ebleco ĝin konstrui, ĉar mankis elementoj komunaj ĉe pluraj nacioj.

Due — la krea solzamenhofa periodo, dum kiu elĝermis la primitiva «Lingvo Internacia», kristaligita en 1885.

Trie — la periodo agad-publika, kiu ekestis en aŭtuno 1887, kaj kiu daŭras ankoraŭ nun.

UNUA PARTO

Rigardo al la Blanka Raso

En virgaj pra-arbaroj de tropika Afrik-Azio, post milionjara zoevoluo, levigis la prahomo, kies posteuloj & parencoj (antropoidoj) vivas ancor-nun en samaj terpartoj.

Agema parto de la prahomaro migradis al nordo & okcidento, al liber-ebenoj Eŭropaj. Renkontinte sin tie, la du pra-razoj miksiĝis, adaptiĝis al nova freŝa klimato, kaj formis plurajn subrasojn, el kiuj gravas por nia studo nur du: la nordika (skandia) & la baltoslava (vistula). Ili komuna trajto — malgraŭ la diferencoj en alto, kranio, vizaĝo — estas la ekstreme hela koloro de haroj, haŭto, okuloj. Tiujn du subrasojn ni nomos kune: la Blanka Raso.

El multaj hipotezoj & teorioj, publikitaj de post 1860, kaj precipe inter 1880 & 1910, ni elektas tiun, kiu — sur la duobla bazo antropologia & lingvistika — klarigas la naskon de la hindeŭropa lingvo per la pratempa (prehistoria) kunfandiĝo de la Blanka Raso kun la poste alveninta Bruna Raso el centr-azia steparo. La kvar ceteraj eŭropasoj, brunaj, malhelaj, loĝis tiutempe sur marbordoj, en montaro, parolante nehindeŭropajn lokajn dialektojn: ugrofinna, eskima, iberia, baska, ligura, berbera, etruska, pelasga, k.a.

En postaj migradoj, miksiĝoj, interinfluo, parto da Blanka Raso adoptis ugro-finnajn dialektojn, kaj preskaŭ ĉiuj brunaj razoj adoptis la hindeŭropan lingvon, iagrade kriplitan en ĉiu aparta grupo, laŭ ĝia loka naturo.

Tiaj senĉesaj transformadoj, intersanĝadoj, daŭris dum multaj jarmiloj, ĝis la Neolitika epoko (de polurita ŝtonilaro), kiam okazas io nova: al estetika arto de afrik-devenaj homoj aldoniĝas utila industrio de azianoj, kun ilia hejmita brutaro: ĉevalo, bovo, ŝafo, kun ilia kulturata greno, plantaro, fera tekniko.

Unufoje en Eŭropo aperas sidloka kampa, ĝardena, urba kulturo. Tamen parto da eŭropanoj daŭrigas sian migran ĉasistan vivon, kaj aliloke sian vagadon kun pastataj brutaroj.

En plej fruktoriga ebena Eŭropo, inter la nordaj & sudaj maroj, de Uralo ĝis Bohema montaro, koncentriĝas la paca laborema loĝantaro, kies najbarado & komercado helpas al la unueco de dialektoj, al la kristaliĝo de unu granda «hindeŭropa» lingvo. Tiu granda lingvo formiĝis precipe sur la Blankrasa tavolo.

La lingvo de tiu blanka raso, kun ĝia kampa kulturo, disvastiĝas ĉirkaŭen, varbas brunajn, malhelajn tribojn, & pro reciproka influo, plifortiĝas interne. La virga land-naturo devigis homojn serĉi, elpensi, krei, organizi... ĉiufoje kiam mankis nutroj aŭ vestoj. Mizero & lukto estis plej efikaj instruantoj de la kulturo. Klimato kun frosta vintro ne permesis al homoj dolĉe dormeti tutjare, kiel ie en Taitio, kie fruktoj pendas, eĉ falas rekte en la buŝojn... gravas la fakto ke la Blanka raso severe edukigis en la arbaroj & sur la vastaj kampoj de la plej granda ebenaĵo de la terglobo; ebenaĵo egale malproksima de glaciazaj dezertoj & de tropikaj varmejoj... Tiu escepte favora regiono, moderklimata & vivabunda, situis inter Volgo & Elbo, inter Balta & Nigra maroj. Facilvoja ebenaĵo, kun miloj da riveroj, sen limbaroj & kun senlimaj liberaj spacoj — estis predestinita rendevuejo por ĉiuj migrantaj popoloj & ĉiuj aventuraj vaguloj de la tri kontinentoj. Ĝi do estis lulilo de la plej progresema raso.

Tiuepoke estis ofte uzata la radiko wind en la senco: blanka, hela, klara, gaja, libera. La Balta maro, kies nomo eĉ nun sencas «blanka» (ĉe latvo-lituvoj), iam estis nomata «winda maro» (Sinus Venedicus). Tie estis la urbo «Windava». La nuna aŭstria ĉefurbo (Wien) tiam havis la nomon «Vindobona». La montara regiono, de la nuna Bavario, Helvetio & Tirolo, tiam enhavis plurajn lokojn kun la radiko «wind» en senco: popola, liberpopola, blankrasa. Resume, la peza vorto «hindeŭropa» povus avantaĝe malaperi, kaj liberigi la posteron por la pli ĝusta nomo «vinda».

(Daŭrigota)

Veranto, uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 104, Turnhout.